# En sikula lando

Oldřich Arnošt Fischer kaj Gabriella Stier

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 22-an de januaro 2014

**Enkonduko**

Kiam mi estis knabo (1962), mi legis fabelon „Glacia Regno“ de Elek Benedek (1859 - 1929), kiu estis kolektanto de fabeloj, kiel ĉe ni ekzemple Karel Jaromín Erben. En tiu fabelo estis vortoj „sikulo“, „sikula lando“ kaj „sikulmaniere“. Tiam mi ankoraŭ tute ne sciis, ke mi iam vizitos landon de la sikuloj kaj renkontiĝos kun ili.

Ordinara loĝanto de Ĉeĥa Respubliko eĉ nun ne scias, kie situas sikula lando kaj kiuj estas sikuloj. La sikula lando situas en Rumanio, en Transilvania Baseno, en distriktoj Harghita (*hungare* Hargita), Covasna (Kovászna) kaj Mureş (Maros). Precipe sikuloj, rumanoj kaj germanoj loĝas en tiu teritorio (1300 km$^2$). Signifaj centroj jam en mezepoko estis urboj Târgu Mureş (Marosvásárhely), Miercurea Ciuc (Csíkszereda), Sfântu Gheorghe (Sepsiszentgyorgy) kaj Odorheiu Secuiese (Székelyudvarhely). La sikuloj estas hungaroj, kiuj parolas hungaran dialekton kaj havas siajn proprajn tradiciojn. **Bildo 1**

## Teorioj pri deveno de la sikuloj

Mezepoka kronikisto Anonimulo priskribis en sia kroniko Gesta Hungarorum (1196-1203), ke kiam hungaroj ekokupis nuntempan patrujon (896 post Kristo), la sikuloj jam estis loĝantoj de Karpata Baseno. La kroniko konsideras, ke la sikuloj originas de la hunoj. Ĝi subtenas la legendon, ke la sikuloj estas posteuloj de tiuj 3000 hunoj, kiuj post la morto de reĝo Attila (453 post Kristo), per gvidado de reĝido Ĉaba post unu malvenko retiriĝis en la teritorion de la nuna Sikullando. La sikuloj jam ekzistantaj en Karpata Baseno bonvenigis, akceptis la enirantajn hungarojn je la patrujokupado, kaj aliĝis al ili en la jaro 896.

La hungaroj estas parencoj de la hunoj; reganta dinastio de la Arpadoj estis posteuloj de Attila. Sed la hungaroj kaj sikuloj originas de la diversaj branĉoj de la hunoj.

Ekzistas teorio de duobla okupado de patrujo. Laŭ tiu teorio en la unua ondo alvenis la avaroj (estontaj sikuloj), ĉirkaŭ en la jaro 670, la dua ondo estis la 896 jara patrujokupo.

Kelkaj teorioj konsideras, ke la sikuloj devenas de la skitoj. La vorto sikulo devenas de la vorto skito.

Sed neniu el ĉi tiuj teorioj estis pruvita.

## Mezepoka historio de la sikuloj

Sikulo, hungare „székely“, signifas „limgardisto“. La sikuloj origine loĝis en la okcidenta parto de Hungario, por gardi la limojn. Pli poste ili estis translokigitaj en Transilvanion ĝis la 13-a jarcento. Ekzistas dokumentoj, kiuj pruvas, ke en tiu periodo estis fonditaj iliaj preĝejoj. La sikuloj estis translokigitaj en la orientan parton de Transilvanio, por defendi la limojn. Ili estis utiligitaj kiel skoltoj (antaŭarmeo) de hungara armeo dum la militoj. Pri la transilvaniaj sikuloj ekzistas aŭtentikaj dokumentoj de la jaro 1211.

La teritoriaj administrativaj unuoj (partoj) estis nomitaj seĝoj. La sikula aŭtonomio signifis, ke la sikularo estis kapabla krei memstare leĝojn, kiuj estis validaj, se estis akceptitaj okaze de naciaj kunsidoj. La mezepoka sikularo en Mezorienta Eŭropo estis demokrata kaj libera. La gvidantoj, estroj estis elektitaj inter sikuloj. Ekstere de Sikullando la sikuloj havis egalajn rajtojn kiel hungaraj nobeloj. La estro de Sikullando estis la ĵupano (distriktestro), kiu estis nomita de hungara reĝo.

Apud la hungara nobelaro la sikuloj partoprenis kiel egalrajtaj partneroj en la koalicio de tri nacioj (1437), formata el hungaroj, sikuloj, saksoj. Tiu koalicio kontrolis politikan agadon de Transilvanio.

Reganto rekompecis la sikulojn por iliaj militservoj donante al ili bienojn kaj permesante al ili

gardi iliajn praajn demokratajn kutimojn. Ili ne devis pagi impostojn.

Inter sikuloj ne ekzistis sociaj klasoj. Ne povis formiĝi sociaj diferencoj, ĉar oni povis heredi nur per direkta branĉo. Se en la familio estis filoj, ili heredis la teron, se ne, la filinoj heredis ĝin. Se ne ekzistis direkt-branĉa heredanto, la propraĵo riĉigis la komune uzatan teron. Tamen iom da diferenco ekzistis laŭ tio, ke ili povis partopreni en la bataloj kun propraj ĉevaloj aŭ sen ĉevaloj. Laŭ tio en la armeo riĉaj sikuloj apartenis al kavalerio kaj malriĉaj al infanterio.

Siajn privilegiojn la sikuloj povis gardi ĝis la 16-a jarcento. La regantoj de Transilvania Princlando ofte provis forpreni ilin, kaŭze de tio la sikuloj multfoje ribelis.

La batalo apud Mohács (la 29-an de aŭgusto 1526), kie falis juna Ludoviko Jagello, estis signifa batalo inter la Hungara Reĝlando kaj la Otomana Imperio, kiu finiĝis per totala malvenko de tuta hungara armeo. Hungario estis disigita en 3 partoj dum pli ol 150 jaroj.

Formiĝis la memstara Transilvania Princlando (Principato). La subtenado de la Transilvania ŝtato postulis ankaŭ de la sikuloj materialajn (financajn) ŝarĝojn. Pro tio la sikularo jam devis pagi impostojn. La sikuloj konsideris, ke tio estas ofendigo de ilia praa libereco. Nur la princoj de Transilvanio Bocskai István (1557-1606) kaj Bethlen Gábor (1580-1629) povis akordigi la pezajn materiajn ŝarĝojn al libereco de la sikuloj. Sikuloj ĉiam luktis en bataloj de nobeloj(transilvaniaj princoj) Bocskai, Bethlen kaj Rákóczi.

La limodefenda kaj armila(j) servoj de la sikularo daŭris ĝis la fino de la 17-a jarcento, kiam Transilvanio iĝis posedaĵo de Habsburgoj.

En la batalo por libereco gvidita de Ferenc Rákóczi II, inter jaroj 1704-1711, la sikuloj luktis kontraŭ aŭstroj kune kun kurucoj. Post la malvenko de la liberecbatalo la armiloj estis forprenitaj de la sikuloj, sikulajn vilaĝojn okupis germanaj habsburgaj armeoj.

Post la jaro 1711 la Transilvania Princlando iĝis aparta ŝtatadministrada provinco de habsburga imperio, kiu estis estrita de aŭstraj gubernantoj. Dum regado de Maria Tereza (1740-1780) estis forprenitaj la sikulaj privilegioj.

En la jaro 1763 la reĝino volis fari perforte novan organizadon de la sikula limgardado

La sikuloj kolektiĝis en vilaĝo Madéfalva, kaj postulis la konservadon de iliaj tradicioj kaj rajtoj. La imperiaj taĉmentoj atakis ilin, kaj pli ol 200 sikuloj estis murditaj. Tiun eventon de la historio oni nomas Siculicidium – sikula amasbuĉado. Kaŭze de perfortoj kaj devigoj multe da sikuloj elmigris en Moldovon kaj Bukovinon.

### Sikuloj en la 19-a jarcento

En la hungara revolucio de 1848-a jaro 60 000 sikulaj voluntuloj partoprenis en la bataloj, kontraŭ la Habsburga Imperio. Ili estis la plej bravaj soldatoj de generalo Bem.

Post la malvenko de la revolucio de 1848, kaj post la aŭstra-hungara interkonsento de 1867, la sikulaj privilegioj komplete perdiĝis. La historiaj seĝoj estis transformitaj en 5 komitatoj.

### Post la unua mondmilito

En la unua mondmilito, kiam pro la malvenko la Aŭstro-Hungara Monarĥio elpaŝis el la milito, Rumanio komencis la atakon por la okupado de Transilvanio kaj parto de Hungario malantaŭ la rivero Tisza. La rumanoj ne respektis la demarkacian linion difinitan de Antanto, progresis ale al Hungario. La sikuloj volis establi memstaran Sikulan Respublikon, de kiu armea forto estintus la Sikula Divizio. Sed oni estis apogitaj nek de aliaj transilvaniaj hungaroj nek de Budapeŝto (kiu timis, ke perdos Sikullandon). La sikuloj estis forlasitaj de hungaroj, la rumanaj armeoj okupis Transilvanion, kaj ankaŭ Sikullandon.

La 1-an de decembro, 1918 okazis Nacia Kunsido, en Alba Iulia (Alba Julia)( hungare Gyulafehérvár), kie 1228 rumanaj deputitoj deklaris la aligon (anekson) de Transilvanio, Banato, Partio, Maramureŝo al la Rumana Reĝlando. Oni ne demandis, petis la opinion de hungaroj, saksoj, ŝvaboj, judoj kaj aliaj kunvivantaj nacioj, kiuj formis 40 procentan parton de la loĝantaro.

La manifesto de tiu Nacia Kunsido enhavas tiujn principojn:

1. Plena nacia libereco por ĉiuj kunvivantaj popoloj. Ĉiuj nacioj havas rajton en sia propra lingvo partopreni al la publika instruado, la ŝtata administrado kaj la justico. Ĉiuj popoloj laŭ ilia nombra proporcio per deputitoj havas rajton partopreni al leĝdonado kaj regado de la lando.
2. Egalajn rajtojn kaj plenan konfesian liberecon por ĉiuj konfesioj de la lando.

Ĉi tiuj principoj restis nur malplenaj vortoj. Oni tute senhavigis la hungarojn (inklusive la sikulojn) de rajtoj pri memdecido. En la 4-a de junio 1920 la antantaj potencoj kaj la hungara delegacio subskribis la packontrakton de Trianono. Laŭ tio Sikullando kaj aliaj regionoj iĝis definitive parto de Rumanio. Post la unua mondmilito Sikullando iĝis parto de Rumanio.

**Dum socialismo**

Komence de jaro 1948 oni enkondukis komunistan reĝimon per kolektivizado de la agrikulturo, ŝtatiĝoj, deportadoj kaj formado de unuecapartia reĝimo.
En la jaro 1952 formiĝis la Hungara Aŭtonoma Provinco, kiu enhavis preskaŭ la tutan Sikullandon. Tie krome la rumana lingvo estis oficiala ankaŭ la hungara. En la jaro 1968 Nicolae Ceausescu [ĉaŭŝesku] neniigis tiun provincon formante nuntempajn distriktojn. Diktatoro Ceausescu ordonis detrui 8000 vilaĝojn kaj setligi, precipe hungare parolantajn, vilaĝanojn en urbojn.

## Celado al aŭtonomio

„La sikuloj celas atingi la aŭtonomion de Sikullando, kies oficiala lingvo estu la hungara kaj sekundare la rumana. La regiono ne celas apartigon de Rumanio, ili ŝatus nur aŭtonomion kaj memadministracion ene de Rumanio (kiel ekzistas en Sud-Tirolo, Sicilio,Vojvodino kaj en hispanaj provincoj.) La rumana registaro neas eĉ la fakton, ke tiu ĉi regiono ekzistas kaj ekzistis dum la historio malgraŭ tio, ke granda plimulto de la homoj vivantaj en Sikullando sin konfesas sikuloj, uzas la sikulan flagon, kantas la sikulan himnon, kaj anstataŭ la oficiala rumana lingvo parolas en sia ĉiutaga vivo la sikulan dialekton de la hungara.“ - Tio estas citato el Peticio al Rumana registaro kaj nuntempa rumana ĉefministro Victor Ponta.

Sikuloj havas deputitojn de Demokrata Unuiĝo de Hungaroj en rumana Parlamento. Infanoj de sikuloj estas edukitaj en hungara lingvo en hungarlingvaj lernejoj. Kunvivo kun rumana plimulto estas bona, sed ne tute senproblema. Diferencoj estas en lingvoj. Rumana lingvo estas malfacila por la sikuloj.

Ankaŭ religioj diferencas. La sikuloj estas katolikoj aŭ reformitaj aŭ unitariaj kristanoj – la rumanoj estas plej ofte ortodoksaj kristanoj. Ortodoksa religio estas ŝtata religio en Rumanio (tial sur ortodoksaj preĝejoj oni povas ofte rigardi rumanajn flagojn). La sikuloj konzervas hungaran vivstilon. Miksaj (sikukula-rumanaj) edzecoj estas raraj. Estas utila scii ambaŭ lingvojn. La rumana lingvo ankaŭ por nerumanaj infanoj estas instruita kiel gepatra lingvo, ne kiel fremda lingvo en Rumanio.

Rumana prezidento Traian Băsescu proklamis, ke Sikullando neniam estos aŭtonoma, ĉar Rumanio estas unueca nacia ŝtato, la 2-an de februaro 2009.

Sikullando situas en la malvarma regiono de Rumanio. Ĉi tie la vintroj estas longaj kaj tre malvarmaj. Pro tio la hokea ludo estas disvastiĝita. Reprezentantoj de rumana hokea teamo kantis hungaran himnon antaŭ ludbatalo kontraŭ hungara teamo en decembro 2011. Barna Tánczos, estro de rumana hokea asocio, estis fotografita kune kun reprezentantoj de Rumanio kun sikula flago. Vere, ke 18 el 20 hokeistoj estis hungaroj en la rumana teamo.

Sikullando estas la plej malriĉa parto de Rumanio ricevante la plej malgrandajn ŝtatajn kontribuaĵojn.

La 27-an de oktobro 2013 defiladis miloj da homoj en Rumanio kaj Hungario por aŭtonomio de 1 200 000 hungarojn, kiuj loĝas en Rumanio.

**Sikula sciencisto, lingvisto Sándor Kőrösi Csoma**

Sándor Kőrösi Csoma (alinome Aleksandro Csoma de Kőros), naskiĝis la 27-an de marto 1784 en Csomakőros (nuntempe Chiuruş, Rumanio). Post studado en la Kolegio Bethlen en Nagyenyed (nuntempe Aiud, Rumanio) li daŭrigis sian edukadon en Göttingen (Germanio). Li ekiris en Azion por malkovri la lingvan parencojn de hungaroj en la jaro 1819. Li travivis dek jarojn en Okcidenta Tibeto. Tie li redaktis la unuan tibeta-anglan vortaron kaj la unuan tibetan gramatikon (1834). Poste li laboris en la biblioteko de Kolkato komisiite de la Bengala Azia Societo por klasifikadi tibetajn manuskriptajn dokumentojn. li decidis pluesplori postsignojn de hungara prahistorio en la 1836. Talentita lingvisto sciis deksep lingvojn. Li ekiris tibetan Lasaon, sed survoje li malsaniĝis per malario kaj mortis la 11-an de aprilo 1842 en Darĝilingo (*angle* Darjeeling). Tie li estis entombigita.

**Nia vizito de sikula lando en aŭgusto 2013**

Kiam mi rigardis belajn sikulajn folkloraĵojn venditajn en Transilvanio, mi volis viziti Sikullandon. **Bildo 2, Bildo 3, Bildo 4, Bildo 5, Bildo 6** kaj **Bildo 7** - Ni veturis tien el transilvania urbo Cluj-Napoca (*hungare* Kolozsvár, *ĉeĥe* Kluž). Veturado per rapidtrajno daŭris ses horojn. La rapidtrajno iris norden kaj poste sudorienten. Malaltejon ŝanĝigis belegaj rumanaj Karpatoj. Nokte ni akiris banlokan urbeton Tuŝnado (*rumane* Băile Tuşnad, *hungare* Tusnádfürdő). **Bildo 8** - Multe da hoteloj kaj penzionoj estas tie, klientoj parolas precipe hungaran kaj rumanan. Ni promenis en Tuŝnado propter loka fiŝlago kaj rivero Olt kaj trinkis mineralan akvon. **Bildo 9, Bildo 10, Bildo 11, Bildo 12, Bildo 13, Bildo 14, Bildo 15** kaj **Bildo 16**. - Krom tio ni vizitis urbon Csíkszereda kun fortikaĵo Mikó - **Bildo 17** - kaj romkatolikan pilgriman lokon Csíksomlyó.

**Bildo 18** - Bela pilgrima preĝejo kaj franciskana monaĥejo estas tie. **Bildo 19, Bildo 20, Bildo 21, Bildo 22, Bildo 23, Bildo 24** kaj **Bildo 25.** - Ni fotis belan skulptitajn pordegojn, kiuj estas tipika por Sikullando. Mi ankaŭ unufoje admiris hungaran runan skribon, kiun la sikuloj ĝis nunscias kaj uzadas. **Bildo 26, Bildo 27**. - Nomo de tiu runa skribo estas rovásírás (noĉa skribo, *ĉeĥe* vrubové písmo). **Bildo 28, Bildo 29, Bildo 30** kaj **Bildo 31**. - Ĉirkaŭaĵo de Csíksomlyó estas pentrinda. **Bildo 32** – El mondo de insektoj fotis hemipterojn de la specio *Lygaeus saxatilis* (**Bildo 33**), tetigoniedon *Decticus verrucosus* (**Bildo 34**) kaj papilion *Papilio machaon* (**Bildo 35**) en Csíksomlyó. Tiuj specioj troviĝas ankaŭ en Ĉeĥa respubliko. Sikuloj renkontiĝas tie en pilgrimoj. Ili portas naciajn kostumojn. **Bildo 36** - Sikula himno (*en fino de la teksto de tiu preleĝo*) estas simila al ĉeĥa himno „Kie estas nia hejm´?“ („Kde domov můj?“), ĉar en ambaŭ himnoj oni kantas pri serĉado de patrujo. Sikula flago estas blua kun okradia suno, kiu estas simbolo de ok ĝis nun ekzistantaj sikulaj seĝoj (administraj centroj) kaj kreskanta luno, kiu simbolas sikulajn kredon, esperon kaj fidemon. **Bildo 37** – Mi estas feliĉa, ke mi ne nur rigardis belajn sikulajn folkloraĵojn (**Bildo 38, Bildo 39, Bildo 40** kaj **Bildo 41**), sed vizitis sikulan landon kaj renkontiĝis kun ĝiaj laboremaj kaj fieraj loĝantoj.

Kiam ni volis forveturi el Tuŝnado, mi vidis frumatene (je la 4-a horo) veran sovaĝan karpatan urson, kiu antaŭ fervojstacidomo serĉis nutraĵon en kontejneroj kun komunuma balaaĵo. Mi fotis ĝin (**Bildo 42**).

**Sikuloj batalis kontraŭ Napoleono en batalo apud Slavkov en Moravio**

La sikuloj havas eĉ proksiman rilaton al moravia historio. Du monumentoj de sikulaj kaj hungaraj soldatoj, kiuj falis en batalo apud Slavkov (*germane* Austerlitz) la 2-an de decembro 1805, troviĝas en sudmoravia vilaĝo Telnice. **Bildo 43** - Tute 4000 soldatojn apartenis al kvar sikulaj infanteriaj batalionoj, sikula husara regimento kaj hungara la 4-a husara regimento. Ili estis parto de avano de aliancana divizio de Kienmayer. Tasko de tiuj soldatoj estis konkerado kaj defendado de la vilaĝo. Kun rusa kaj kroata helpoj ili plenumigis la taskon kaj batalis ĝis fina

retiro de Aliancanoj. Falis aŭ estis vunditaj pli ol 1700 soldatojn en Telnice. Laŭ antikva hungara kutimo oni tombon de falita soldato markis per lia rompita pikstango. Pli poste oni anstataŭis la pikstangon per ligna steleo, kolumno kun simboloj *(hungare*: kopjafa). **Bildo 44** - Ankaŭ du steleoj en Telnice estas ornamitaj per simboloj: ĉapo signifas, ke la steleo apartenas al viroj, sed tie estas ankaŭ tulipo, simbolo de sikulaj patrinoj, edzinoj kaj vidvinoj, kiuj vane atendis sikulajn heroojn hejme. Suno kaj luno (**Bildo 45**) estas simboloj, kiuj estas sur sikulaj flago kaj blazono.

**Konkludo**

Kulturaj kontaktoj sikuloj kaj hungaroj kun moravianoj estis tre oftaj en pasinteco. Ni kontinuu konadon de unu la alia!

## SZÉKELY HIMNUSZ

Ki tudja merre, merre visz a végzet,
Göröngyös úton, sötét éjjelen,
Vezesd még egyszer győzelemre néped,
Csaba királyfi, csillagösvényen!
Maroknyi székely porlik mint a szikla.
Népek harcának zajló tengerén;
Fejünk az ár, jaj százszor elborítja,
Ne hagyd elveszni Erdélyt, Istenünk!

## SIKULA HIMNO

Kien la fato kondukas vaganton,
Sur voj' kavoza, en malluma nokt'
Gvidu refoje al venk' la popolon,
Ĉaba reĝido, sur ĉiela pad'!
Manplen sikuloj: polviĝanta roko.
Sur brua maro de l' popol- batal',
Torento nin jam volas tute kovri,
Transilvanion savu bona Di'!

Esperantigis Paŭlo Gajdos (Debrecen, Hungario)

**Rekomendita literaturo**


AŬTORA GRUPO (1991): Erdély, paĝoj 587-601. Révai Nagy Lexikona,VI. kötet, Hasonmás kiadás, Szépirodalmi és Babits könyvkiadó, 787 paĝoj.

AŬTORA GRUPO (1994): Székelyek eredete, paĝoj 450-453. Révai Nagy Lexikona XVII. kötet, Hasonmás kiadás, Babits könyvkiadó, 875 paĝoj.

FISCHER, O.A. (2012): Lando, kiu neestante estas. Esperanto Brno – Kluba prelego, la 25-an de aprilo 2012. http://www.medy.cz/brno-esperanto/fischer-lando%20kiu%20neestante%20estas.pdf.

FISCHER, O.A., STIER, G. (2013): Urbo Satu Mare en Transilvanio. Esperanto Brno – Kluba prelego, la 13-an de marto 2013. http://www.medy.cz/brno-esperanto/fischer-Satu%20Mare.pdf.

FRIEDRICH, K. (2005): Rovásírás tankönyv és szakkori ötlettár. 3-a eld., Budapest, 69 paĝoj.

HORA-HOŘEJŠ, P. (1995): Toulky českou minulostí, vol. 2, 1-a eld., Prago, Baronet, 454 paĝoj.


JANCSÓ, B. (1921): A székelyek. Történeti és néprajzi tanulmány. Hornyánszky Viktor M. Kir. Udv. Nyomdája, Budapest, 46 paĝoj.

SZÁDECKY KARDOSS, L. (1927): A Székely Nemzet története és alkotmánya, "Hargitaváralja" J. Sz. K. a Franklin-Társulat, Budapest, 175 paĝoj.

TARJÁN, T. (2013): A románok gyulafehérvári nagygyűlése kimondja Erdély elszakadását. Rubiconline. Történelmi magazin.

THALER, T., LASZLOVSZKY, K. & POLGÁR, F. (2013): Székelyföld – Évezredes legendák, évszázados hagyományok. 1-a eld., Alternativ Kiadó, 94 paĝoj.

Sikula lando (blua) en Rumanio kaj sikula blazono



1

Sikula telero



2

Sikula telero



3

Sikulaj brodaĵoj



4




Předchozí strana

**HEJMA BENO**

Kie estas KREDO,
tie estas amo.
Kie estas AMO,
tie estas paco.
Kie estas PACO,
tie estas beno.
Kie estas BENO,
tie estas la Dio.
Kie estas la DIO,
tie neniu manko
estas.

5

Sikulaj ceramikaĵoj



6

Sikulaj ceramikaĵoj



7

Fervojstacidomo en Tusnádfürdő




8

Tusnádfürdő



9

Rivero Olt



10

Ponto trans la rivero Olt en Tusnádfürdő



11

Romkatolika preĝejo en Tusnádfürdő



12


Ortodoksa preĝejo en Tusnádfürdő





13

Lago Ĉukaŝ (Lacul Ciucaş) en Tusnádfürdő



14

Gabriella Stier fotas sikulan pordegon en Tusnádfürdő



15

Sikula pordego



16

Fortikaĵo Mikó en Csíkszereda



17

Csíksomlyó



18

Franciskanoj en Csíksomlyó




19

Pilgrima preĝejo en Csíksomlyó



20

Pilgrima preĝejo en Csíksomlyó



21

Franciskana monaĥejo en Csíksomlyó




22

Granda kaj pura necesejo en Csíksomlyó



23

PACO KAJ BONO! - Franciskana monaĥejo en Csíksomlyó




24

Franciskana monaĥejo kun monumento de János Kájoni (1629-1687), pastro, komponisto, orgenisto kaj tradukisto de kantoj



25

Sikula pordego kun hungara noĉa skribo (rovásírás)




26

Sikula noĉa skribo (rovásírás)




27

Hungara noĉa skribo (rovásírás)





28

Hungara noĉa skribo (rovásírás)





29

Hungara noĉa skribo (rovásírás)




30

Hungara noĉa skribo (rovásírás)




31

**Csíksomlyó**



32

*Lygaeus saxatilis* (Hemiptera: Lygaeidae)



33

*Decticus verrucosus* (Orthoptera: Tettigoniidae)



34

*Papilio machaon* (*ĉeĥe:* otakárek fenyklový)




35

Sikulaj infanoj en naciaj kostumoj



36

Sikula flago



37

Sikula pordego



38

Sikulaj brodaĵoj



39

Sikulaj mielkukoj



40

Sikulaj mielkukoj



41

Urso antaŭ fervojstacidomo en Tusnádfürdő



42

**Vilaĝo Telnice (16 km sudoriente de Brno)**



43

**Monumentoj al sikulaj kaj hungaraj soldatoj en Telnice**



44

**Monumentoj al sikulaj kaj hungaraj soldatoj en Telnice**



45